# *Neidentigitaj individuoj mortigis la prezidenton de Haitio*



Porto-Princo, jul 7 (RHK) La prezidento de Haitio, Jovenel Moïse, estis murdita hiera? vespere en armita atako, la? konfirmis Claude Joseph,  provizora ?efministro de la lando.

?irka? la unua matene, grupo de nekonataj homoj, "iuj el kiuj parolis hispane", atakis la privatan lo?ejon de la prezidento kaj mortige vundis lin, diris  komuniko.

La unua damo, Martine Moïse, estis pafvundita  dum la atako kaj estas kuracata en hospitalo.

Dume, la portempa ?efministro kaj la Nacia Polico kondamnis "?i tiun abomenan, malhumanan kaj barbaran agon", alvokante la lo?antaron trankvili?i, deklarante, ke la sekureca situacio en la lando "estas sub kontrolo" de la Polico kaj la Armitaj Fortoj.

"?iuj rimedoj estas prenitaj por garantii la kontinuecon de la ?tato kaj protekti la nacion", diris la deklaro, por konkludi, ke "demokratio kaj respubliko venkos."

Fonto: RT

---

https://www.radiohc.cu/eo/noticias/internacionales/263114-neidentigitaj-individuoj-mortigis-la-prezidenton-de-haitio

Radio Habana Cuba